# Historio de Goo en Ĉinio

- Tradukaĵo el retpaĝo;
https://zh.wikipedia.org/wiki/围棋史
- Antaŭ la *Qin* (秦)-dinastio
- Sub Dinastioj *Han* (漢), *Wei* （魏） kaj *Jin* (晋)
- Sub Suda kaj Norda Dinastioj (南北朝)
- Sub Dinastioj *Sui* (隋) kaj *Tang* (唐)
- Sub dinastioj *Song* (宋)- kaj *Yuan* (元)
- Sub dinastioj *Ming* (明) kaj *Qing* (清)
- Periodo de la Respubliko de Ĉinio en la kontinento
- En Ĉina Popola Respubliko

# - Sub dinastioj *Song*(宋: p.K. 960-1279) kaj *Yuan*(元: p.K. 1271-1368)

En la *Song*-dinastio, *Zhang Yi*(張擬) imitis "La Milit-arto de *Sunzi* (孫子)" por verki "La Dek tri Ĉapitroj de la GO-Principoj(棋經十三篇)", kiu havis profundan influon al la teorio kaj praktiko de la posta GOo. Dum la Norda *Song*(宋)-periodo(antaŭ p.K. 1127), *Liu Zhongfu* (劉仲甫) verkis multajn verkojn pri GOo, inkluzive "Kolekto de Ĉagrenon-Forgeso kaj Pura Gajo(忘憂清楽集)", "Pozicioj de ŝtonoj (棋勢)", "Fina lim-aranĝo (造微)", "Detala teorio (精理)", "Sekretoj de GOo (棋诀)" kaj aliaj.

Ankaŭ kleruloj kaj lojalaj ŝtatistoj de la Norda *Song*(宋)-periodo, kiel *Fan Zhongyan*(范仲淹), *Ouyang Xiu*(歐陽修), *Sima Guang*(司馬光), *Wang Anshi*(王安石), *Su Dongpo*(蘇東坡), kaj *Huang Tingjian*(黃庭堅), ĉiuj havis altan lertecon en GOo.

En la *Yuan* (元)-dinastio, *Yan Defu* (嚴德甫) kaj *Yan Tianzhang* (晏天章) redaktis “la Mistera GOa klasikaĵo (玄玄棋經)”, kiu enhavis multajn teoriojn de antaŭuloj kaj grandan nombron da problemoj pri viv-morto kaj formulaj formoj en GOo.





# Historio de Goo en Ĉinio

- Antaŭ la *Qin*（秦）-dinastio
- Sub Dinastioj *Han*（漢）, *Wei*（魏）kaj *Jin*（晋）
- Sub Suda kaj Norda Dinastioj（南北朝）
- Sub Dinastioj *Sui*（隋）kaj *Tang*（唐）
- Sub dinastioj *Song*（宋）- kaj *Yuan*（元）
- Sub dinastioj *Ming*（明）kaj *Qing*（清）
- Periodo de la Respubliko de Ĉinio en la kontinento
- En Ĉina Popola Respubliko


# - Sub dinastioj *Ming* (明: p.K. 1368-1664) kaj *Qing* (清: p.K. 1636-1912)

Je la fino de la *Ming* (明)-dinastio, la fama nacia ludanto *Guo Bailing* (過百齢) verkis la konatan "Finaĵa Manlibro" (官子譜), kiu registris multajn esencajn lertajn manovrojn de GOo.

Tamen, ludado por vetado inter la popolamasoj tiutempe fariĝis tre populara, tiel ke la *Ming* (明)-imperiestro *Zhu Yuanzhang* (朱元璋) eĉ proklamis malpermeson kontraŭ GOo.



Dum la frua *Qing* (清)–dinastio, multaj lertaj ludantoj aperis. En la regado de imperiestro *Kangxi* (康熙), la sanktulo de GOo *Huang Longshi* (黃龍士) estis senekzempla. Li donis tri ŝtonojn al sia lernanto *Xu Xingyou* (徐星友) kaj ludis dekon da famaj partioj, kiuj estis poste kolektitaj en la verko "Sanga kaj larma ĉapitro(血泪篇)", konsiderata fama ekzemplo de ludado kun anticipe metitaj ŝtonoj.


黃龍士先生棋譜

顧復初題


黃龍士先生棋譜序

龍士先生名譚家世生平事蹟均無可考惟別字月天見於圍棊近譜及不古編載其爲邗江人他則不少概見先生年十八即成國弈同時如盛大有淩元煥輩皆之無不披靡惟周東侯徐星友差可頡頏可知其天姿穎異具有夙根矣先生之弈綿密深穩出奇制勝往往別饒妙境洽所謂身有仙骨者歟獨其局面大意猶未純粹以精長由國初風氣初開尚有前人習氣迨後梁程施范精益求精弈理愈明弈法大備實先生有以啟之也余友無錫鄧純丰素工弈搜羅舊譜繁費若心近年集梁范施程梁各譜校刻極精遂選孚購因念先生之弈散見諸譜者陳局雖

一

弈潛齋刻本

En la 4-a jaro de imperiestro *Qianlong* (乾隆)(p.K. 1739), *Shi Dingan* (施定庵) kaj *Fan Xiping* (范西屏), du gigantoj, batalis en *Zhejiang* (浙江), *Pinghu* (平湖), kaj heredigis la faman "Dek partioj de *Danghu* (当湖十局)", kies ludado estis ekscita kaj mirinda, kun lertoj taksataj inter la plej elstaraj en la tuta ĉina historio de GOo.




Dum la *Ming* (明)- kaj *Qing* (清)-epokoj, multaj ludantoj krom instruado kaj gvidludado, vivtenis sin per la "donacoj" (帮彩) kaj "vetdonacoj" (賭彩) donitaj de spektantoj (plejparte altaj oficistoj, riĉaj komercistoj kaj intelektuloj). Tio estis sendube vivtena maniero dependa de bonŝanco. Se oni vivas en tempo de paco kaj prospero, la nobelaro havis pli da tempo por kulturaj agadoj, do GOo flore kreskis, kaj la vivo de ludantoj estis stabila.

"Multaj batalas por supereco, ludante milojn da partioj" kaj "Dekoj da naciaj ludantoj vojiras inter *Changjiang* (長江) kaj *Huaihe* (淮河)", tiel *Wang Xie* (王燮) priskribis la florantan GOan mondon en sia Antaŭparolo al "la Skribaĵo pri GOo(弈墨)".

Tamen, kiam la popolo suferis, ankaŭ la vivo de GOaj ludantoj fariĝis malfacila, kaj la nivelo de la ludo malkreskis, kun malmultaj posteuloj.

Ekde la malfrua periodo de *Qianlong*(乾隆), la nivelo de ĉina GOo rapide malaltiĝis. La lasta granda majstro de la malfrua *Qing*, *Zhou Xiaosong*(周小松), taksis la ludojn de "la Dek partioj de Danghu" jene: "Profundaj intencoj, ne facile komenteblaj — komento estus memtrompo." Pli postaj ludantoj, kiel *Wang Yunfeng*(汪雲峰), laŭ taksoj, bezonis du ŝtonojn donitajn por povi kontraŭstari *Zhou Xiaosong*(周小松).

En la malfrua *Qing*(清) kaj frua Respubliko Ĉinio, japana ludanto TAKABE Douhei(高部道平) plurfoje vizitis Ĉinion por interŝanĝoj. Tiam, li estis nur 4a-DANa (poste promociĝis je 5a-DANo en 1912 kaj je 6a DANo en-1918), tamen povis doni du ŝtonojn anticipe-metitajn al ĉinaj pintaj ludantoj.



# Historio de Goo en Ĉinio

- Antaŭ la *Qin* (秦)-dinastio
- Sub Dinastioj *Han* (漢), *Wei* (魏) kaj *Jin* (晋)
- Sub Suda kaj Norda Dinastioj (南北朝)
- Sub Dinastioj *Sui* (隋) kaj *Tang* (唐)
- Sub dinastioj *Song* (宋)- kaj *Yuan* (元)
- Sub dinastioj *Ming* (明) kaj *Qing* (清)
- Periodo de la Respubliko de Ĉinio en la kontinento
- En Ĉina Popola Respubliko

# Historio de Goo en Ĉinio

- Antaŭ la *Qin*（秦）-dinastio
- Sub Dinastioj *Han*（漢）, *Wei*（魏）kaj *Jin*（晋）
- Sub Suda kaj Norda Dinastioj（南北朝）
- Sub Dinastioj *Sui*（隋）kaj *Tang*（唐）
- Sub dinastioj *Song*（宋）- kaj *Yuan*（元）
- Sub dinastioj *Ming*（明）kaj *Qing*（清）
- Periodo de la Respubliko de Ĉinio en la kontinento
- En Ĉina Popola Respubliko

# - Periodo de la Respubliko de Ĉinio en la kontinento (p.K. 1912-1949)

De la fino de la *Qing* (清)-dinastio ĝis la periodo de la *Beiyang* (北洋)-registaro(p.K. 1913-1928), en la domo de *Duan Qirui* (段祺瑞) kolektiĝis kelkaj el la plej fortaj ĉinaj ludantoj de tiu epoko, inkluzive *Wang Yunfeng* (汪雲峰), *Gu Shuiru* (顧水如), *Liu Dihuai* (劉棣懐), kaj *Guo Xuchu* (過旭初). El ili, *Gu Shuiru* (顧水如) studis GOon en Japanio dum kelkaj jaroj kaj estis agnoskita kiel 4a-DANa.

En 1914 naskiĝis *Wu Qingyuan* (吳清源). En 1926, li, ludante blanke, venkis *Liu Dihuai* (劉棣懐), tiel fariĝante fakte la plej forta ludanto de Ĉinio. En 1928, *Wu Qingyuan* (吳清源) veturis al Japanio.



## Historio de Goo en Ĉinio

- Antaŭ la *Qin*（秦）-dinastio
- Sub Dinastioj *Han*（漢）, *Wei*（魏） kaj *Jin*（晋）
- Sub Suda kaj Norda Dinastioj（南北朝）
- Sub Dinastioj *Sui*（隋） kaj *Tang*（唐）
- Sub dinastioj *Song*（宋）- kaj *Yuan*（元）
- Sub dinastioj *Ming*（明） kaj *Qing*（清）
- Periodo de la Respubliko de Ĉinio en la kontinento
- En Ĉina Popola Respubliko

# – En Ĉina Popola Respubliko

Post la fondiĝo de la Popola Respubliko Ĉinio en 1949, la profesia nivelo en Ĉinio estis tre malalta.

Ekde 1960, ĉiujare okazis Ĉina-Japana GO-Amikeca Matĉo. Inter ili, en la dua fojo en 1961, la japana GO-reprezentantaro vizitis Ĉinion, kaj la 55-jara 5a-DANa (virino) ITOU Tomoe(伊藤友惠 1907-1987) venkis ĉiujn ĉefajn ĉinajn ludantojn de tiu tempo, akirante ok sinsekvajn venkojn. En 1964, la evento estis renomiita al Ĉina-Japana GO-Konkurso kaj daŭris ĝis 1991.

Post la Nacia Individua Turniro en 1962, laŭ la rezultoj, 43 homoj estis premiitaj per profesiaj rangoj, kun la plej alta estante 5a-DANa – tio estis la unua fojo kiam Ĉinio enkondukis la DAN-sistemon por GOo. Tamen, baldaŭ poste, la DAN-sistemo kaj aliaj klasifikaj sistemoj estis aboliciitaj. En 1982, Ĉinio restarigis la DAN-sistemon.

